

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 2/2002
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Aprilo 2002

NOTO DE REDAKTANTO KAJ VENDISTO

Look inside for:

President's message

On -Ĵ- and -Ĵ-

El la CO

La angla - ilo de Esperanto

Recenzo: La Flambirdo

ELNA Convention

Leteru!

New Books

2
3
4
5
6
8
9
10

Post kelkara foresto, estas iom interese denove redakti (eĉ se nur provizore) la bultenon de ELNA. Mi esperas, ke vi trovos ĝin daŭre interesa.

Vi eble rimarkos kelkajn ŝanĝojn en la nuna numero. Ĉefa inter ili estas la listo "Leteru". Mi ricevis permeson uzi la retan liston, kiun ĉiumonate kolektas s-ro Enrique Ellemberg, por plenigi tiun rubrikon; tio helpas la legantojn de *Esperanto USA* kaj ĝi helpas la personojn, kiuj iris al li serĉante korespondamikojn tra la mondo. La listo en ĉi tiu monato estas supozeble iom pli granda ol ĝi estontece estos, pro lastatempa apero de multaj novaj esperantistoj inter afganaj rifuĝintoj en Irano; ili lernas la lingvon per la nova programo Zaban-e-Salam, lingvo de paco, kiun financas UEA pere de donacoj de membroj.

Mi ankaŭ enŝovas artikolon, kiun mi longtempe volas skribi, pri la sufiksoj -Ĵ- kaj -Ĵ-. Espereble ni povos estontece aperigi aliajn artikolojn pri la lingvo mem, kiuj helpas kaj al novaj esperantistoj kaj al progresantoj (kaj, kelkfoje, eĉ al "flue parolantoj" – eble surprizus vin scii, kiom ofte mi renkontas erarojn ĉe tiaj kompetentuloj, ankaŭ ĉe mi mem, kiun almenaŭ mi opinias kompetenta).

En la venonta monato reaperos paĝo entute dediĉita al la lokaj grupoj, kiuj estas la fundamento de la movado, en Usono same kiel en aliaj landoj. Tie vi povas legi ekz-e pri lastatempaj prezentoj en Seattle kaj San Francisco, pri la ĵus finiĝinta Calico2002-Konferenco en Davis (Kalifornio), pri la lastatempa JES en Pensilvanio, kaj pri okazontaj regionaj konferencoj kiel Okemo kaj NOREK. Kompreneble, aperos ankaŭ raporto pri la baldaŭa ELNA-Kongreso ĉe la Hotelo Hawthorn Suites en Sacramento.

(Cetere, kvankam mi devas pardonpeti pri la malfruco de ĉi tiu numero – mi ankoraŭ lernas la novpokan laboron en la C.O. de ELNA – mi ne pardonpetos pro la unumonata malfruco de la venonta numero, ĉar mi prokrastos aperigi ĝin ĝuste por ebligi enŝovi la kongresraporton. Ne forgesu, ke la ELNA-Kongreso okazos dum la semajnfino 21-24 junio; vi ankoraŭ povas aliĝi pere de <<http://www.esperanto.org/ELNA2002/>> — aŭ simple aperu kaj aliĝu ĉe la pordo, se vi deziras, kvankam eble tiam okazos problemoj pri la bankedo ...)

Kiam mi redaktis la bultenon antaŭe, ĝi enhavis leterorubrikon, en kiu anoj de ELNA (kaj aliaj) povis prezenti siajn opiniojn pri diversaj aferoj. Mi deziras, ke ankaŭ tio fariĝu denove konstanta rubriko.

Mi menciuj ankaŭ, ke mi nun pli-malpli respondecas pri la libroservo de ELNA. En ĉi tiu numero vi trovos tutan paĝon da novaj libroj kiuj estas haveblaj ĉe la libroservo; mi menciuj, ke ni havas tiom da novaj libroj, ke ankaŭ la paĝo por la venonta numero estas preta, kaj restas tuta stako da novaj libroj ankoraŭ ne enpaĝigitaj. Do, kaptu la okazon iom aĉeti; se vi havas kreditkarton, vi povas tion fari ankaŭ pere de <<http://www.esperanto-usa.org/>> .

Se vi havas proponojn pri artikoloj / informoj kiujn vi volas vidi, aŭ pri libroj kiujn vi volas aĉeti, ne hezitu kontakti min pri tio. Mi estas atingebla aŭ ĉe la ELNA Centra Oficejo (PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, retpoŝte <e-usa@esperanto-usa.org>, telefono +1 510 653 0998) aŭ hejme (PO Box 551, Pinole CA 94564, retpoŝte <donh@donh.best.vwh.net>; poŝtelefono +1 510 913 4800).

Don Harlow

"Zamenhof once wrote that Esperanto is to ethnic language as a canal is to a river. You don't have to make a canal winding and irregular to imitate a river. A beautiful canal can be straight and simple. Hundreds have tried to create a universal language, including some linguists. But only Esperanto has taken hold to become a living, working language with a worldwide community of speakers."

-- Dr. E. James Lieberman
in *Language Magazine*, Mar. 2002

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
% 510/653-0998; 2 510/653-1468
: elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: David T Wolff
Vice President/Vicprezidanto: Grant Goodall

Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj: Thomas Alexander, Jennifer Bondelid, Peggy Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow, Ralph Lewin, Elizabeth Raible, Orlando E Raola, Derek Roff

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Joel Brozovsky
Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo: Donald Harlow

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 38, No. 2
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468
✉ donh@esperanto-usa.org

Materials for esperanto usa should be sent to/Materialojn por esperanto usa oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
or by e-mail/aŭ e-poŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la re-publikigita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 24.06.2002

Sez the Prez

Saluton ĉiuj,

Our annual elections are coming up soon. Please take a moment to visit our website, <www.esperanto-usa.org>, and check out the quarterly reports. This is the best way to see who is contributing to our organization, at least for current Board members. If you don't have access to the Web, please ask a friend to help you. We've accumulated quite a lot of info, and some of it is quite interesting!

Special thanks to Philip Dorcas, the head of the Nominating Committee for this year's elections. Thanks also to Anna Bennett, Don Harlow, Fred Meyer, and Alex Schlafer, the other members of the committee. If you don't like the candidates, you have only yourself to blame for not nominating someone better (or running yourself!). But you will like them.

This column seems to be mostly Internet-related... You can now find the "Poster Series," a set of posters for advertising Esperanto, on our website. These are one-page PDF files that you can print and use. Some are good for any audience (such as the "French verbs versus Esperanto verbs"), some for specific audiences (such as a couple aimed for science fiction fans). Thanks to Jay Fishman for putting these on the website so quickly.

Another Jay item: Jay complained that ELNA has not told our members about important information in a timely fashion. Since *Esperanto USA* appears only every two months, it's difficult to tell you about breaking news. So we have set up a new mailing list, <elna-anoncoj@yahoogroups.com>. It will have only announcements (no discussions), so you will not receive a flood of messages from it. This re-

places the old "ELNA Elektronika Bulteno," which has not been used in some years and which was harder to keep up to date. I encourage everyone to sign up for this mailing list. To do so, just e-mail any message to <elna-anoncoj-subscribe@yahoogroups.com> (the message and subject can be empty). You will get a verification message; reply to it to finish signing up. You can also visit <groups.yahoo.com>, search on "elna-anoncoj" and follow the instructions. You'll be able to unsubscribe at any time.

If you know Esperantists who do not have access to e-mail or the Web, please join this list and tell them about announcements. I recommend that every local group assign a person to monitor the list and get the word out when we do have announcements. If you don't have e-mail or Web access, check your local library. Many of them have public-access PCs that you can use.

Also remember that ELNA members can discuss anything through the mailing list <elna_membroj@yahoogroups.com> (this has an underscore instead of a dash). This list gets more messages; any member of the list can post to it.

I am sending an "Ege Bone!" to Dale Gulledge. Dale wrote an excellent article "Free Software is about Freedom, not Software," comparing Esperanto to the open software movement. You can see it at <opensource.schools.org/article.php?story=2002031006145521>.

And our condolences to Anna Bennett, whose mother recently passed away. As you can see, Anna has helped (and is still helping) ELNA in many ways, and we all appreciate her assistance.

Last, after a year of grief at my old ISP, I'm moving my e-mail address. The new one is dwolff@panix.com. Let me know if you have any trouble reaching me there.

David Wolff, President
<dwolff@panix.com>
(978) 264-0286 (8-10pm Eastern time weekdays, noon-5pm weekends)

NEW MEMBERS Jan. – Feb. 2002

Ni volas bonvenigi al ELNA la jenajn novajn membrojn de la asocio:

Aldona Ballard (Sarasota, FL), Perry Barnett (Billerica, MA), Gonzalo Bermudez (Barrington, MA), Brendan G. Bohannon (Sun Valley, NV), Adam Carruth (Long Beach, CA), R. Alan Craig (Corfu, NY), James De Moss (Abilene, TX), Christi Denton (Berkeley, CA), Thomas Forehand (Clarksville, TN), Shoshona Francis (Berkeley, CA), Andrew Given (Saint Paul, MN), Tiffany Gray (Oakland, CA), Herb Huang (Palo Alto, CA), Celeste Hutchins (Berke-

ley, CA), Arthur C. Johnson (Lakeville, MN), Cynthia S. Kisse (Minneapolis, MN), Aaron G. Larsen (Harrisburg, PA), Geoffrey Lesh and family (Gold River, CA), Robert A. Lively (Reno, NV), Anita L. Mills (Dallas, TX), Ben Oakes (Harlan, IA), H. Neal Parker (Houston, TX), Erin M. Piatieski (Damascus, MD), Bryan G. Replogle (Newport News, VA), Kendra L. Swope (Austin, TX), Keith Thomson (Grand Junction, CO), Frank E. M. White (Peterborough, NH).

THE MOST IMPORTANT SUFFIXES

I am often impressed by the fact that almost every Esperanto textbook – at least for English speakers – starts out describing the word-formation system with the prefix **MAL-** and the suffix **-IN-**. This can lead to occasional problems with students of the language – some people are upset by the **-IN-** suffix because it puts women in an inferior position (though one might argue that it, in fact, puts them in a superior position), while others complain that **MAL-** really should mean “bad” and not “opposite”. On the other hand, from the point of view of facility of use they are two of the easiest to explain. **MAL-** can be used with any word that has an antonym, and just about everybody can figure out the difference between male and female (though, I must confess, it took me a few years ...). So it’s really no wonder that most expositions of the language start out with these two, other complaints notwithstanding.

Other affixes are a bit less easy to understand, and this is particularly true of the two that I consider the most important in the language. These are **-IG-** and **-Ĝ-**.

To understand how these work, let’s go back to the most basic aspects of using affixes in Esperanto word-creation. Most, perhaps all, Esperanto roots (not words) fall into three basic categories: *object* roots, *attribute* roots and *action* roots. For reasons of simplicity, the Academy of Esperanto generally refers to these as *noun* roots, *adjective* roots and *verb* roots, respectively; but this is a bit misleading, since any root can be used as a noun, an adjective or a verb. Nevertheless, for the sake of consistency I’ll use these terms.

Some affixes don’t care what type of root they attach to; **MAL-**, **-EG-** and **-ET-** (which also usually appear fairly early in the textbooks) are the best examples I can think of. On the other hand, **-IN-** generally wants to attach to a noun root; it would make little sense to associate it with an attribute or an action, since attributes and actions generally are not male or female. Most affixes, like **-IN-**, want to be attached to a certain type of root. This is usually not a problem; most affixes are strong enough to twist the root to which they are attached to the meaning they want. For instance, we know that *ŝton*’ is a noun root; the suffix **-EC-** wants to be attached to an adjective root; so when you attach it to *ŝton*’, you essentially change the meaning from the name of an object (a stone) to the attribute most closely associated with that type of object (stony), and the result is *ŝtoneco* (stoniness).

-IG- and **-Ĝ-** both want to start out with an adjective root, and when they are attached to such a root, their meaning is evident. Both of them show a *change of state* into the state described by the root. **-Ĝ-** just indicates that the state of the verb’s subject has changed: *pura* = clean, *la*

domo puriĝas = the house becomes clean; *ruĝa* = red, *miaj vangoj ruĝiĝis* = my cheeks turned red, I blushed. **-IG-** however shows that the verb’s subject has *caused something else to change state*: *ŝi purigas la domon* = she causes the house to become clean, she cleans the house; *lia frapo ruĝigis mian vangon* = his slap turned my cheek red.

So far, so good. The same description is equally applicable to noun roots, except that the **-Ĝ-** or **-IG-**, like **-EC-** in the above example, twists the noun root into an adjective meaning when it’s attached to it. *Ŝtono* = stone, *ŝtona* = stony: *la dinosaŭro dum jarmilionoj ŝtoniĝis* = the dinosaur became stony (turned to stone, became petrified) over millions of years; *la efiko de la tempo ŝtonigis la dinosaŭron* = time’s effects turned the dinosaur stony (turned it to stone, petrified it).

We encounter, however, a problem when we try to add **-IG-** and **-Ĝ-** to a verb root. Here, we deviate from logic. It is quite possible to add one of these suffixes to a verb root, thus twisting the meaning of the root, but the result is not what we expect when we use the suffixes. For instance, consider the expression *sida loko* (a place for sitting). We ought to be able to say *la loko sidiĝis* (the place became suitable for sitting). But that’s not what *sidiĝis* means, is it. Why not?

Sida is an adjective and describes a state, in the sense that adjectives describe states. But it’s a very rare adjective, a very unused one. It is possible that one could go through his or her entire life without using it. When it comes to verb roots, the most common related adjectives describing states are the participles. So, one might think, logic notwithstanding, why waste a good suffix?

Obviously, you can apply one of these suffixes to a participle. *La viro sidantiĝis* = the man became sitting, the man sat down; *la virino sidantigis lin* = the woman caused him to be sitting, the woman sat him down. This is a logical and perfectly legitimate usage, but it’s not too common. Presumably the logic of non-logic is: nobody but nobody is ever going to use *sidiĝis* in the sense of *iĝis sida*; why not simply use it for *iĝis sidanta* and get rid of that extra syllable? So, today, people say: *la viro sidiĝis* for *la viro sidantiĝis* and *la virino sidigis lin* for *la virino sidantigis lin*. And that way the suffixes are commonly used with verb roots, where if they were used with strict logic, they would simply not be used very much, if at all.

(Side note: the astute student of Esperanto will ask, “What’s the difference, then, between *sidiĝi* and *eksidi*, the latter using **EK-** which is a prefix that shows the beginning of an action?” The answer: for most practical purposes, none at all. If you become a great author in Esperanto,

you will probably find good reasons for selecting *sidiĝi* in one place and *eksidi* in another, if only to add a bit of variation to your vocabulary; but in ordinary conversation, feel free to use whichever one you personally prefer.)

Now another complication arises. Esperanto verbs generally fall into two categories: those which show something that the subject is doing that affects only it; and those which show something that the subject is doing that affects someone or something else. For conciseness, we can refer to these as *transitive* and *intransitive* verbs respectively. Note that transitivity and intransitivity are not grammatical qualities of the verbs themselves, but simply characteristics of their meanings.

An intransitive verb by its nature can’t have a passive participle; so when you add **-Ĝ-** or **-IG-** to an intransitive verb, you’re always assuming an *-ant-* or an *-int-* being added, not an *-at-* or an *-it-* (*sidiĝi* means *sidantiĝi*, but it can’t mean *sidiĝi*, since *sidad-* does not exist). But a transitive verb has both sorts of participles. The situation is equally simple when you add **-Ĝ-** to a transitive verb: there is a tacit addition of an *-at-* or an *-it-* to the verb. *Ŝi kisiĝis* = she was (became) kissed = *ŝi kisatiĝis*.

The final problem that we’ll discuss arises when you add **-IG-** to a transitive verb. Consider the phrase (which Zamenhof also considered): *Li sciigis tion al mi*. This means (with the addition of an *-at-*) *li sciATigis tion al mi* (he made that known to me). But couldn’t you equally well say *li sciigis min pri tio* (*li sciANTigis min pri tio*, he made me know[ing] about that)? Or if not, which form is correct? Zamenhof’s answer (in one of his *lingvaj respondoj*) was that it was not necessary to split hairs so carefully, since the form of the two objects (which you treated as direct and which indirect) would resolve the problem; you can say either one, and, if you wish, stick in the participial suffixes to be more pedantically accurate.

So, what we come down to are a few simple rules describing **-IG-** and **-Ĝ-** with verbs:

(1) When you add **-Ĝ-** or **-IG-** to a verb that *doesn’t* take a direct object, you’re also tacitly adding an *-ant-* (or an *-int-*);

(2) When you add **-Ĝ-** to a verb that *does* take a direct object, you’re also tacitly adding an *-at-* (or an *-it-*);

(3) When you add **-IG-** to a verb that *does* take a direct object, you are also tacitly adding either one of these, and you can show which one it is either by explicitly putting it into the word or by letting the way you treat the resulting two objects show what you mean.

— Don Harlow

El la CO

La CO evoluas

Ni finadiaŭas nian fidelan vicdirektoron de la Centra Oficejo de ELNA, Ionel Onet, kiu ekde la komenco de majo enposteniĝos kiel la estro de la libroservo de UEA. Li anstataŭos s-ron Simo Milojeviĉ, kiu emeritiĝas. Multan dankon al Ionel, kiu dediĉis preskaŭ 14 jarojn de sia vivo al ELNA, kun granda efiko.

Ni ankoraŭ akceptas sinproponojn por anstataŭi lin, por unu el du postenoj: vicdirektoro de la oficejo (plentempa posteno) aŭ redaktoro de *Esperanto USA* (ses fojojn jare, povas esti farata hejme per propra komputilo). Interesatoj sendu al mi ĉe la oficejo siajn karierskizon kaj leteron klarigantan siajn Esperanto-historion kaj kialojn deziri labori por ELNA. Vidu la antaŭan numeron de *Esperanto USA* por pliaj informoj, aŭ kontaktu min ĉe <joel@esperanto-usa.org> aŭ per telefono aŭ paperpoŝto al la oficejo.

Dume, Don Harlow provizore plenumas tiujn postenojn, do la oficeja funkciado daŭras pli-malpli glate.

Practice Esperanto by phone

ELNA has a new service available: a telephone conference service, where up to 30 lines at a time can join in conversation. This service is free. The only cost is that of telephoning to the conference server, which is in Florida.

To use the service, simply call (305) 503-6682 and follow the directions to choose one of a thousand available "chat rooms" by dialing a three digit number. You will be connected to everyone else who chose that three digit number. The number for Esperanto (chosen arbitrarily to match ELNA's P.O. box number) is 129. If a few people wish to carry on their own conversation separate from the others, they can at any time go to another "chat room" by dialing its three digit number, which they can decide on the spot.

Every day from 19:00 to 19:30 Chicago time volunteers will be on the phone ready to speak with callers, so that participants will be assured of finding someone there when they call. Besides that, anyone can use the service at any time, even for a simple three-way conversation between friends.


Those who use the service often may wish to buy low-priced long distance telephone service. There are several such services that charge less than three cents per minute for anywhere within the 48 contiguous states. These services can usually be found in the Internet. There is a comparison at www.phonecards.com.

de Joel Brozovsky, Direktoro, Centra Oficejo de ELNA

ELNA elections are underway

The ballots for the election of five positions on the Board of Directors have been sent out to all members. Be sure to mark your ballots and get them back to the Central Office before June 20th, 2002. Or you can bring them to ELNA's 50th anniversary conference in Sacramento and personally hand them over to me, Joel Brozovsky, on Friday June 21st. If you are a member of ELNA and didn't receive a ballot, contact the Central Office to request one.

The candidates for president are Lee Miller and Alexander Shlafer. For vice president the Kandidatiga Komitato found only one candidate: Phil Dorcas. For the three other positions on the Board of Directors there are five candidates: Don Coleman, D. Gary Grady, Jacob Schwartz, Tim Westover, and David Wolff. A big thank you to the five members of the Kandidatiga Komitato.



Joel Brozovsky
Direktoro, C.O.



Ionel Onet
Antaŭa Vic-Direktoro, C.O.


Postal rates are still moving

Unfortunately, it is entirely unnecessary to explain in which direction the postal rates are moving, since they have always gone in the same direction: upwards. We have a hard time keeping up with the increases, and the fact that the postal service sometimes doesn't publish details of the new rates until weeks after they go into effect doesn't make it any easier.

With the new catalog, which members and Friends should have already received, the minimum postage fees have been raised slightly, from \$1.75 to \$1.80 for domestic surface mail, and from \$2.25 to \$2.50 for foreign addresses, or faster domestic delivery. See the inside front cover of the 2002 catalog for details.

Unfortunately, after we sent the catalog to the printers, the US Postal Service announced another substantial rate increase, the second one this year, which will probably go into effect in July. Details have not yet been announced (other than the basic letter cost going from 34 to 37 cents), but when they are, it may be necessary for us to again raise the postage fees charged for the book service. If so, it will be announced here and incorporated into the web store.

Meanwhile, new publications keep coming out, and we have a long list of books added to ELNA's book service since the new catalog was published. Take a look at *New from the Book Service* on page 10. You are quite likely to find something to pique your interest. There are also some new offerings in the catalog which have not appeared here.



Don Harlow
Nuna Vic-Direktoro, C.O.

Jen opinio de unu el niaj regulaj legantoj kaj fojaj kontribuantoj, kies nomon vi certe rememoras de "La Angla Avantaĝo", peco aperinta originale en ĉi tiu revuo kaj poste reaperinta en kelkaj alilandaj Esperanto-revuoj (ekz-e Litova Stelo). Ĉu vi havas reagon al ĉi tiu opinio de s-ano Drown? Se jes, ne hezitu informi nin pri tio ĉe "Esperanto USA, Opinioj, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 (Usono)".

Donations to ELNA - Jan.-Feb. 2002

La Angla: Ilo de Esperanto Deno DROWN

Mi havis lastatempe ideon pri Esperanto en mia lando — Usono. Usono estas treege granda kaj pro tio, ĝi estas unu el tiuj landoj en kiu oni povas longe vojaĝi sen forlasi la landon. La plimulto de usonanoj ne vojaĝas eksterlanden dum siaj feritagoj. Fari tion temas pri longa, multkosta vojaĝo. Anstataŭe ili emas vojaĝi en sia propra lando ĉar ja estas nekalkulebla nombro da belaj kaj tre vizitindaj lokoj en la lando mem. Do usonanoj dum siaj feritagoj spertas interesajn ŝanĝojn de pejzaĝo, kuir-stilo, kaj kutimoj, sed ne de lingvo.

Krom en malmultaj el ĉelandlimaj urboj, ĉiuj en Usono parolas la anglan, kaj nur la anglan. La akĉentoj povas esti iome malsamaj, sed ĉiuj komprenas sin sen malfacilaĵo. Tio igas la vojaĝon tre plaĉa por tipa usonano. Tamen tio ekiĝas malkomforta kiam oni pensas pri vojaĝo en iu loko kie oni ne povus paroli la lingvon. Nu, jen alia kialo por ne vojaĝi ekster la lando — aŭ eble sekvontjare ni iru al Anglio aŭ Aŭstralio.

Tiu komforto pri resti en gepatralingvejo kaj malkomforto pri provi sperton en neanglaparolanta lando pliprofundigaas pro la edukosistemo en Usono kiu apenaŭ traktas la lernadon de fremdaj lingvoj. Dum la dek du jaroj de la elementa lernejo kaj liceo, tipa usona lernanto devas studi nur du jarojn da iu fremda lingvo. Komparu tion kun aliaj landoj el kiuj multaj igas siajn studentojn eklerni iun lingvon ekde la fruaj lernejoj jaroj.

Ĉu do estas surprizo ke la plimulto de usonanoj eĉ ne priatendis Esperanton? Kaj eĉ se ili konas la nomon, ili ofte pensas ke ĝi temas pri iu preskaŭ-morta provprojekto kiu nun estas tute nenecesa ĉar la mondo jam havas la anglan kiel internacian lingvon.

Usonanoj tute ne emas lerni fremdajn

The following kindly donated to ELNA activities during the months of January and February, 2002: John J. Betz (\$500, arranged via Microsoft Matching Funds); SFERO (\$299); Pauline W. Ledeen (\$110); Ellen M. Eddy (\$100); D. Gary Grady (\$76.22); Myron A. Bondelid (\$60); Thomas H. Goodman (\$50.55); Sally M. Lawton, Julie Spickler, Lisa Tauxe (\$50 each); Irene M. Leland (\$40); Donald D. Nielsen (\$35); Maya G. Kennedy (\$30); Lelan S. Conti (\$27); Dorothy B. Holland, Julie L. Regal (\$25 each); Charlene Baker, Leah S. Goldberg, Wongill Kim, Steven E. Sorenson, Andrew Tagliabue (\$20 each); Mark O. Lambert (\$14); Michael O. Austin (\$10.80); Grace Cali, Carleton W. Carroll, Rebecca Djang, Annette E. Greenland, F. J. "Ken" Kennelly, R. P. Lynch, Thomas Martin, Arthur P. Poole, Witold Symonowicz, Jose R. Vazquez and William P. White (\$10 each). Donations were also received from George Baker, Aldona N. Ballard, Children Around the World, Adin Eichler and Tiffany Gray. Donations were variously given to the General Fund, the Gibson Endowment Fund, the Glenny Fund, the History Fund, the Klara Zamenhof Fund, the NASKE Fund, the Video Fund, the Thompson Fund, the Goldman Fund, the Ellen Lewis Fund, the Schulze Fund, the Wolff Fund and Children Around the World.


lingvojn. Vi trovos ke multaj eĉ pensus ke Esperanto estus tre bona ideo post kiam vi klarigos al ili pri la lingvo, sed vereble neniam ili lernos ĝin.

Mi tute konsentas ke tre gravas ke Esperantisto esperantumas kun ano de aliaj landoj per korespondado, partoprenado, ktp. Mi opinias tamen, ke usonaj esperantistoj havas kroman taskon kiun ili devas fari ne per Esperanto sed per sia gepatra lingvo, la angla, kaj tio temas pri ŝanĝo de nia kutima opinio pri la utileco de la angla tra la mondo. Ni devas klarigi al usonanoj kio estas Esperanto kaj kia povus esti nia mondo se ni uzus ĝin kiel interkomunikilon. Ni devas igi Usonanojn esperantemaj antaŭ ol ni povos esperantigi ilin. Kiam mi eklernis Esperanton, mi estis tre timema kiam mi volis paroli pri ĝi kun miaj amikoj, familianoj, kaj konatoj. Poste kiam mi iomete plikuraĝiĝis, mi provis konvinki kelkajn el ili, ke ili lernu la lingvon. Tio estis granda malsukceso. Nun mi agas alimaniere. Nun mi koncentriĝas pri klarigi al ili pri kio estas Esperanto kaj kial

ĝi tre utilas en la mondo. Se ili ne prizorgas ke ili mem devu lerni la lingvon, ili kutime akceptas la ideon kaj eĉ diras ke ĝi ŝajnas tre bona. Ofte ili volas lerni almenaŭ kiel diri "Saluton" aŭ "Mi amas vin."

Ne eblas ke mi sukcesos trovi multajn usonanojn kiuj emus lerni Esperanton. Tamen se ĉiuj miaj ĉirkaŭuloj bone scias pri la lingvo kaj pri tio kion ĝi ofertas al la mondo, eble ili parolos pri ĝi kun siaj konatoj. Ili povas helpi diskonigi la ideon de Esperanto eĉ se ili mem ne scipovas la lingvon, kaj ili povas trovi la lernemulojn kiujn mi neniam renkontos.

Ŝajnas al mi iomete strange ke mi povas helpi la esperantan movadon per la lingvo kiu ofte ŝajnas esti la konkuranto de Esperanto. Tamen mi devas memori ke je la fina venko, la angla ankoraŭ estos tre grava lingvo en tiuj landoj kiuj nomas ĝin la gepatra. Ni klopodu disdoni informon pri Esperanto kaj ties boneco, eĉ al tiuj kiuj ne esperantemas, kaj eĉ per la angla.



La Flambirdo: parto futuro, Tezuka Osamu. Translated by Konisi Gaku. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 2001. 295p. Kodo: FLA003; prezo: \$18.10

When I was growing up in the USA, the first books that interested me enough to make me want to learn to read were the comic books that my older siblings were reading. Superman was obviously an American creation, and I naturally assumed that comics in general were

American. I wasn't alone in this thought. Books that I found in the library about the history of comics barely touched on caricatures from other countries; the authors claimed that comics as we know them were developed in the US, and that they are produced and read mostly in the US.

That last information has been long out of date. The quantity of comics published in Japan in a single week far exceeds the annual production in the US. About 40% of all literature published in Japan is in the form of comics, called in Japanese *manga*. Commuters of all ages on trains throughout Japan are reading, mostly, comics. There are comic magazines published weekly by the millions, and books similarly published in the millions. Here, comics have barely edged out of the children's market into some of the Baby-boomers who grew up with comics (some would say, that they never grew up...) and still like them. But they are still frowned upon by the majority of adults, and by most literary critics. Pity! The comics medium has so much potential.

One great visionary who tapped into some of that potential was TEZUKA Osamu. Educated to be a surgeon, he instead became perhaps the greatest creator of comics the world has known. The current and lasting boom in comics in Japan is attributed largely to Tezuka, known as the father of comics and animation in Japan.

Tezuka created many comics characters and series, spanning a wide gamut of types and situations. His artwork is clear, often detailed, and humorous, even when the story is serious. I have enjoyed "reading" many of his books in Japanese, without understanding most of what was written - his drawings are that good. And now, we have the privilege of being able to read one of his books and understand the words too! *La Flambirdo* (literally *The Flame Bird*, originally *Hi no tori*) is a theme that Tezuka worked on from time to time throughout much of his productive life. It is considered to be his masterwork, although many of his works, if done by others, could easily also qualify as

masterworks. The volume translated, the episode *Future*, is the second of nine volumes featuring the Flame Bird. It starts in the year 3404 with the earth on its deathbed, but time can be somewhat circular in the world of Tezuka. The title character, the Flame Bird, shows up only from time to time throughout the very long time frame of this series, but always has an important effect on the principal characters of the segment.

The characters, while cartoony, can seem quite real. The story certainly can be classified as science fiction, and the author's education as a scientist (medical doctor) shows through in the relatively high credibility of the fictional science portrayed. But what makes it a masterwork is the surprisingly profound treatment of universal life questions.

William Auld's poetry masterwork, *La infana raso*, comments on the human race in a provocative and thought-provoking way. This book of Tezuka's, in my opinion, is no less profound in its discussion of the human race. Even though the story is very engrossing and keeps the reader turning the pages the first time through, one is left with much to think about after finishing the book. A second more thoughtful reading is very worthwhile.

The translator, Konisi Gaku, a member of the Academy of Esperanto, is perhaps the world's leading translator from Japanese into Esperanto today. He is a physics professor who, as a child, wanted to become a comics artist like Tezuka. He was even tutored for a while by his idol Tezuka.

This is a comic book that is not intended for children, although some children would certainly enjoy it too. I would recommend this book even to those who think that they don't like comics. It is a happy marriage of high literature and popular science fiction in a form that is very accessible and very enjoyable. If you see something that looks familiar in the book, it is probably because so many later authors have been inspired by Tezuka's ideas.

Joel Brozovsky

Mallia, Carmel. **Marionetoj**. Berklio: Eldonejo Bero, 1999. 64 p. Broŝurita. Kodo: MAR001, prezo: \$4.40.

Venas al ni poemaro el landeto ne multe konata rilate Esperanton: Malta. Jam 70jara en 1999, Carmel Mallia prezentas al ni arte siajn pensojn. Sed unue priskribas por ni la etoson maltan lastatempe furora poeto Iberia Goncalo Neves. "Insularo vojkruciĝa kaj kulturfandeja... Ĝia popolo estas esence araba, kaj ĝia lingvo kurioze semidas kun itala aromo kaj iom da angla leksiko-pripro

[tiel]."

Du kolektetojn Mallia elmetas: *Rapsodie kaj Akrostike*. La aŭtoro prezentis sian lastan poemaron en 1981, 52jara. Neves diras, ke 70jara li "montras evoluon malgraŭ la aĝo."

Sur pĝ. 7 komenciĝas jene la titol-poemo *Marionetoj*.

Jen vi pensoj per kiuj
mi ludadas
fantomoj verve kaj karambole vagantaj
dum dormo

dorlotanta

ŝtormo

disŝiranta

la triumfan pacon ribelantan
kontraŭ la trudemaj truoj

tretantaj

miajn tribunalajn decidojn.

Marionetoj.

Marionetoj.

Sekvas dua strofo. Ambaŭ konsistas el ununura, longa, flua frazo, plus la fina temvorto ripetata.

Aperas sur pĝ. 8 gramatike pli konciza
Serenado

Sterniĝu
sub niaj piedoj alia ĉielo.
Nin gvidu
ventblovoj ĉarmigaj sur ĉaro
stelar-rada.
(ktp)

La ritman efekton prezentas al ni kaj la
sonoj mem kaj la tipografiaj aranĝoj. Tiuj
kunludoj daŭras iugrade tra la libro.

En ĉi tiu 27-era kolekto, sufiĉe varias
la formoj. Ofte frapas fortaj sonludoj, rimaj
kaj alispecaj, foje per adasismoj. Aliloke la
son-agordoj malfacile sentblas. Pravigas
tian diversecon la nomo de la kolekto. La
termino *rapsodio* havas diversajn signifojn.
Rilate muzikajn komponaĵojn implicigas la
ideo de nereguleco.

En la dua parto *Akrostike* venas alia vid-
efekto. Kiel antaŭsciigas ties kolektonomo,

la 17 titoloj re-prezentas sin en la unua litero
de ĉiu verso. Jen specimenoj flank-al-flankaj
(pp. :56-57):

PATRO
*Apologie al malmoderna
familiestro*

Pantalono tro fragila
Aglo? Jes. Sed senflugila.
Titankorpo handikapa;
Rubandeto amoĉapa
Orakolo: ho, jam gapa!

